



ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. — Redaktas Dr Stan. Kamaryt.

Karolo Piĉ: Esperantaj neologismoj

Prelego farita en la Somera Kolegio de Esperanto en Doksy en Julio 1949.

(Fino)

Se ekzistas ia diferenco inter Esperanto kaj la tiel nomataj lingvoj vivantaj, ĝi estas kalkulebla ekskluzive al la juneco de Esperanto unuflanke kaj la maljuneco de ĝiaj konkurantoj aliflanke. Kiam Esperanto estos same maljuna kiel ili, ĝiaj vortoj estos multe pli elvokaj ol la nuntempaj vortoj anglaj aŭ francaj. Sed la maljuneco oni ne povas havigi al la lingvo per la enkonduko de tiom aŭ tiom da neologismoj. La maljuneco povas disponigi nur la tempo. Tial tre malbonan servon faras al la lingvo tiuj sinceraj erarantoj, kiuj konstatinte ke maldekstra ne estas sufiĉe elokventa kaj elvoka, anstataŭigis ĝin per sinistra (proponita de Kalocsay en Poezia Fakvortaro, la lasta kaj plej multe kritikata parto de Parnasa Gvidlibro). Tamen antaŭ ol sinistra povis hejmiĝi en la lingvo kaj akiri almenaŭ kelkajn primitivajn asociojn, aperas lefta (en Aeronautika Terminaro de E. D. Durrant). Sed eĉ ĉi tie la lavango ne haltis. Kaj ni jam vidis eĉ linksa, goŝa kaj lefa sur paĝoj de gazetoj.

Eble malnova aŭ mallonga elvokas nur tre malmultajn rememorojn kaj asociojn en niaj kleraj poetoj kaj verkistoj. Sed pigra, temerara, hida (terure abomena) aŭ tenaca elvokas ankoraŭ pli malmultajn rememorojn kaj asociojn en la kapoj de la gelegantoj. Ĉar la plej multaj esperantistoj tute ne scias, kion signifas pigra, temerara, hida aŭ tenaca. Ili simple ne komprenas ilin. Kaj vortoj, kiujn oni ne komprenas, ne povas elvoki asociojn kaj rememorojn.

Poemoj konsistantaj el nuraj neologismoj restas nelegataj, ĉar mankas komprenantoj. Kaj tiuj, kiuj ilin tamen foliumas, ofte legas ilin nur pro ilia ekstera grafika vesto kaj aspekto. La volupto, kiun ili ĝuas dum ilia silabumado estas precize tiu, kiun oni sentas dum la deĉifrado de dadaismaj versaĵetoj. Ĝi reduktiĝas preskaŭ al nenio.

Tamen pigra, temerara, hida kaj tenaca ne estas tute senutilaj. Ili almenaŭ pravas, ke ne ili, sed la malnovaj „oficialuloj“ estas elvokaj, varmaj kaj bildokreaĵoj. Kaj ili pravas tion eĉ malgraŭ kaj kontraŭ la neologismulaj krioj kaj provokoj.

La rima malriĉeco

La lasta apologio neologisma koncernas ekskluzive la kampon de la esperanta poezio.

En Esperanto ekzistas plenaj kaj sonoraj rimoj, tamen ĉar la uzado de la tiel nomataj adasismoj estas strikte kaj severe malpermesita, la nombro de tiuj rimoj estas tre limigita kaj ĝi preskaŭ egalas al la nombro de samrimaj radikoj. Sed la radikaro esperanta estas nek tro vasta nek tro ampleksa kiel la radikaroj de iuj malnovaj kaj maljunaj lingvoj vivantaj. Krome eĉ multaj el tiuj radikoj pro sia troa teknikeco kaj fakeco estas en la poezio tute neuzablaj, kiel ekzemple entropio aŭ zoofito. Tial esperantaj poetoj kaj precipe esperantaj tradukistoj, volante redoni fremdlingvan tekston en Esperanto kun ĉiuj ĝiaj originalaj rimoj, sonoraj kaj muzikaj, ofte sin sentas

ĝenataj kaj malhelpataj. Kaj neologismoj estas forigontaj tiun ĉi obstaklon.

Tial oni enkondukis ekzemple la vorton *primavero*, kiu estas sinonimo de la malnova kaj oficiala *printempo*, malgraŭ tio, ke en Parnasa Gvidlibro ekzistas 149 erimoj en la normala listo kaj pluaj 52 rimoj estas registritaj en la koncernaj piednotoj. *Printempo* kontraŭe posedas nur du solajn rimkunulojn *tempo* kaj *trempe*. Kaj nun oni povas demandi, kial oni plivastigis ĝuste la jam cetere sufiĉe riĉan *er-vicon*, kiu neniom bezonas pluan ampleksigon, kaj ne la vortmalriĉan *emp-serion*.

La samo sensaŝe validas ankaŭ pri la jam menciita *botono*, kiu havas 180 rimkunulojn en la normala listo de Parnasa Gvidlibro kaj 51 parulojn en la respektivaj piednotoj. Krome la fakto, ke la samsenca *burĝono* estas samrima, tute nuligas la ekzistadon de *botono*, kaj eĉ refutas la lastan apologion neologisman, igante ĝin nefidinda kaj dubinda.

Tamen aliflanke ekzistas multegaj vortoj kiel *nadlo*, *fajfi*, *majstro*, *falĉi* ktp., kiuj estas tute senrimaj kaj kiuj bezonus ian rimriĉigon, sed ĝis nun ne ricevis ĝin, ĉar oni riĉigadis tiujn vicojn, kiuj pluan riĉigon nek volis nek bezonis.

Sed ni lasu la disputon. Ne nur la elvoka forto, eĉ la esperantaj rimoj estas grandparte afero de kutimo. Parolante en Lingvo Stilo Formo pri adasismoj, Kalocsay damnis ilin, deklarante ilin nepre kaj plene evitindaj. Tamen ĉi tiun damnon li tuj mildigis dirante, ke iam oni tamen povas allasi ilin, sed nur en tiuj okazoj, kiam en unu aŭ ambaŭ rimvortoj la sufikso jam tiom kunfandiĝis kun la radikoj, ke ĝi kune formis kvazaŭ novan radikon: *homaro* — *arbaro*, *rideti* — *kolereti*, *virino* — *katino*, *pafilo* — *kuracilo*. Tamen la partecipaj finaĵoj *ata*, *ita*, krome *ajo*, *eco*, *igi*, *igi* kaj precipe *adas* laŭ Kalocsay estas adasismoj neniel pardoneblaj.

Sed ni esploru la aferon iom pli detale. Se ni turnos la atenton ekzemple al la *um-vortoj*, ni konstato, ke pro la speciala nedifiniteco de la sufikso *um'* ili devas esti lernataj aparte preskaŭ kiel tute novaj kaj memstaraj radikoj. Tial ankaŭ ĉiuj *um-rimoj* estas konsiderataj ne kiel ordinara adasismoj, sed kiel tute oficialaj rimoj puraj, kaj *brakumi* — *krucumi* aŭ *serpentumi* — *parkerumi* restas same valoraj kiel ekzemple *gloro* — *ploro*. La sufikso *um'* en ili ne estas plu rigardata kiel sufikso. Same ne estas rigardata kiel finaĵo ant' en la rimparo *esperanta* — *ĝojanta*.

Kaj tie ĉi la kampo malfermiĝas. La derivitaj vortoj esperantaj kiel *levilo*, *knabino*, *maneto*, *librejo* aŭ *bonulo* kun la daŭro de la tempo versajne tiom familiariĝos, ke la sufikso en ili fine tute mortos. Ili fariĝos unublokaj kiel similaj vortoj alilingvaj *humanitas*, *doctoresse*, *esclavage* aŭ *imperatrix*. Tiam rimoj kiel *dormema* — *plorema* ĉesos esti adasismoj kaj iĝos rimoj puraj, eĉ se nun tiu perspektivo estas kapabla ŝoki pli ol unu poeton esperantan.

Simila evoluo en multaj lingvoj vivantaj kaj mortintaj cetere jam okazis. Pri tio ne necesas longe foliumi. Ekzemple en la mezepoka latinlingva himno de sankta Tomo Akvina Lauda Sion Salvatorem, lauda ducem et pastorem... la unuaj du rimoj Salvatorem — pastorem estas tiaj ŝtoniĝintaj „adasismoj“ pri kiaj ni parolis pli supre, kiuj tute korespondas al la esperantaj savanto — paŝtanta aŭ savisto — paŝtisto.

Tial ne ekzistas kaŭzo por kredi, ke la sama evoluo, kiu okazis en la aliaj malpli junaj lingvoj kaj idiomoj, ne okazos simile ankaŭ en Esperanto.

Memkompreneble ĝi ne okazos morgaŭ aŭ postmorgaŭ. Sed kiam ĝi okazos, ĝi tiom riĉigos la ne tro riĉan rimaron esperantan, ke ĉiuj prorimaj neologismoj kiel primaverio, botono kaj aliaj en tiu sama momento iĝos superfluaĵoj kaj neĝenate mortos. Ili ripozu pace!

La universaleco de Esperanto — argumento kontraŭneologisma

Oni tiom ofte aŭdis, ke Esperanto estas Lingvo Internacia, ke oni jam preskaŭ tute forĝesis, ke antaŭ ĉio ĝi estas Lingvo Universalaj. Kaj ĝuste la universaleco de Esperanto estas unu el la plej gravaj argumentoj kontraŭneologismaj. Ĉar oni devas ne forĝesi, ke Esperanto estas destinita ne nur por Eŭropanoj kaj Amerikanoj, sed ankaŭ por la grandaj nacioj de Azio, Ĉinoj, Hindoj kaj Japanoj, kiuj havas honoran kaj tute specialan pozicion en la internacia movado.

Ce tiu ĉi okazo estas menciinde ĉi tie, ke Esperanto estas la sola internacia lingvo, kiu sukcesis enradikiĝi en la ĵus nomitaj nacioj de la Malproksima Oriento. Occidentaj, Romanaj, Weltdeutsch kaj aliaj projektoj sporade trovis kelkajn adeptojn en Eŭropo, sed en la Orienton ili ne penetris, ĉar ili estas lingvoj ekskluzive okcidentaj kaj nur eŭropaj. Jam iliaj nomoj ateste pravas tion: Occidentaj — lingvo de la Okcidento, Romanaj — destinita por la latinida loĝantaro de la mondo, Weltdeutsch — servonta al la germana mondoparto.

Se tamen la unua Panazia Kongreso okazinta en Tokio en 1925 esprimis sian favoron al Esperanto, la lingvo dankas tiun sukceson nur al du ŝajne malgravaj detaloj. Unu el ili estas la simpla fakto, ke la aŭtoro de Esperanto, doktoro Zamenhof, estis de hebrea deveno. Nur tiu ĉi detalo donas al la orientaj nacioj iom mildan impreson pri Esperanto. La Hebreoj ja apartenas al la orientaj gentoj. La lingvo de la hebrea majstro do ne estas por ili fremdaĵo kaj nepopulara okcidentaĵo, sed io parenca, al ili tre proksima kaj akceptebla.

La alia kaŭzo estas ankoraŭ malpli multe konata. Sian vorttrezoron Esperanto ĉerpis grandparte el la antikva lingvo latina kaj el la grandaj lingvoj de Eŭropo, la germana, angla kaj franca. Kelkajn nemultajn radikojn ĝi prunteprenis eĉ el la slavaj lingvoj, tamen tiuj ĉi prunteprenoj estas sporadaj kaj pli malpli esceptaj. Tamen ĉe la afiksoj la slava influo estas rimarkebla, kaj la stilo kaj vortordo esperantaj estas jam tute slavdevenaj kaj slavsimilaj. Ankaŭ la gramatiko de Esperanto estas eŭropa, eĉ okcidenteŭropa, iom simila al la angla. Sed ĉiuj ĉi ecoj de Esperanto estas nenio eksterordinara kaj ili mem ne estus kapablaj allogi orientanojn al la lingvo. La samajn ecojn abunde posedas ja ĉiuj aliaj eŭropaj idiomoj, kiujn la orientanoj tamen ne ellernas. Sed la lingvo ne konsistas nur el radikoj kaj kelkaj gramatikaj leĝoj kaj reguloj. La lingvo ja posedas ankaŭ ian strukturon, kiu estas karakteriza kaj propra al ĝi. Kaj la strukturo de Esperanto pro sia speciala aglutina karaktero estas azia, neeŭropa, propra al la orientaj lingvoj kaj idiomoj kaj intime proksima al iliaj konstruo kaj strukturo. Kaj ĝuste la azieco de la esperanta strukturo estas tiu alia trajto de Esperanto, pro kiu la orientanoj proksimiĝas al ĝi kaj ĝin ellernas.

La tiel nomata internacieco de la esperanta radikaro estas io relativa kaj apenaŭ ekzistanta. La esperantaj vortoj estas maksimume intereŭropaj, sed nepre ne internaciaj, ĉar ekzistas neeŭropaj lingvoj parolataj de pli multaj homoj ol iu ajn eŭropa idiomo. Ekzemple la ĉinan lingvon parolas pli ol 500 milionoj da homoj. Nur tre malantaŭe staras la angla kun siaj 300 milionoj da parolantoj, la franca kun siaj proksimume 100 milionoj, la germana kun 90 milionoj kaj la hispana kun 80 milionoj da uzantoj. Krome la aliaj multmilionaj lingvoj orientaj, la japana, malaja kaj la hindaj dialektoj ankoraŭ pli multe malgrandigas la tiom ofte laŭdatan internaciecon de la eŭropa radik-

aro; eĉ ne parolante pri tio, ke multaj tiel nomataj internaciaj vortoj eĉ en Eŭropo ofte estas preskaŭ nekompreneblaj pro sia granda kaj eĉ konfuza diverssenceco, kiel multfoje pravis doktoro Edmont Privat montrante, ke ekzemple la ŝajne tute internacia vorto akademiio signifas societon de sciencistoj en Francujo, privatan liceon en Usono kaj muzikvesperon kun recitaĵoj en Ĉeĥoslovakio.

Pro ĉi tiu neinternacieco de diversaj latindevenaj kaj eŭropdevenaj vortoj precipe la aziaj Esperantoparolantoj tre akre kontraŭstaras la enkondukadon de diversaj neologismoj, kiujn ili ofte konsideras stultaj. Kaj ili tute prave kontraŭdiras, ke laŭkvalite la ĉina lingvo nek staras malpli alte, nek estas malsupera al iu ajn eŭropa idiomo. Ĝi ja estas la sola antikva lingvo kiu ankoraŭ ne mortis kiel la aliaj antikvuloj, la sanskrita, la latina kaj la greka, sed ĝis nun vivas kaj estas parolata. Ĉi tiu ĝia vivanteo pravas ĝian altan kulturalan valoron kaj kvaliton. Kaj la Ĉinoj argumentas, ke sekve de tio la ĉindevenaj radikoj rajtus eniri en la radikaron esperantan same kiel ekzemple la latinaj. Tamen ili ne pretendas tion. Ili ja tro bone scias, kie kuŝas la „delikata punkto“. Sed ili almenaŭ atendas, ke la eŭropaj esperantistoj ne ŝutos en la lingvon amase vortojn kiel arivi, dictionaro, demimondana, semidoktoro kaj aliaj.

Vere internaciaj vortoj apenaŭ ekzistas. Kiel ni jam diris la tiel nomataj vortoj internaciaj kiel plaŭdi, diplomato, balado ktp, ne estas internaciaj, sed intereŭropaj. Eĉ ekzemple futbalo, konata preskaŭ ĉie en la mondo, fakte estas komprenata de relative nur tre malmultaj homoj. 500 milionoj da Ĉinoj ne konas futbalo sed biciklo, kaj pluaĵoj pluraj milionoj da malajalingvanoj parolas pri raga.

Tial la orientaj nacioj ne emas al neologismoj en Esperanto. Ili pli multe ŝatas la malnovajn pure esperantajn vortojn, kiujn ili konsideras pli fidindaj ol la nove enportitajn. Tial ili preferas diri ŝipestro anstataŭ kapitano, maŝinpaŝilo anstataŭ mitralilo, flugmaŝino anstataŭ aeroplano kaj eble anstataŭ probable.

Samkaŭze ili uzas piedpilkludo anstataŭ futbalo, ĉar pilko per kiu oni piedludas estas piedpilko, kaj la ludo mem tute logike piedpilkludo. Ili ne komprenas kial eŭropanoj preferas futbalo, kiu por ili estas tute nekomprenebla kaj eĉ konfuza, ĉar en ĝi piedo kvazaŭ fariĝas futo kaj pilko iĝas balo, tamen alia balo ol tiu, dum kiu oni dancas dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Sume, la orientaj nacioj konsideras nur tre malmultajn vortojn universalaj kaj sekve de tio enkondukindaj en la lingvon. Laŭ ili universalaj vortoj estas maksimume nomoj de diversaj nunepokaj inventaĵoj kiel radio, filmo, kino kaj kelkaj aliaj, kaj vortoj, kiuj devenas de nomoj de sciencistoj kaj eltrovintoj kiel belinogramo (laŭ Edouard Belin), makadamo (Mac Adam, 1757—1836), volto (Volta, 1745—1827), dalio (A. Dahl, sveda botanikisto, kiu transportis la floron el Meksikujo en Hispanujon). En ĉiuj aliaj okazoj ili preferas vortojn formitajn el la oficiala kaj jam ekzistanta materialo. Se ili povus elekti inter telefono kaj malproksimparolilo aŭ inter filmo kaj movbildo ili senhezite elektus la lastajn.

Per tiu ĉi lingva konservativeco ili bridas la respektivajn ekscesojn kaj la troan novigemon de kelkaj eŭropaj esperantistoj.

Ĝuste tiun ĉi rolon de la orientaj nacioj konsideris doktoro E. Privat, kiam li skribis en 1927 en la januara numero de Esperanto la vortojn: „Niaj orientaj amikoj rajtas influu Esperantismon per siaj ideoj kaj konsiloj. Ili rajtas partopreni pli aktive en la regula evoluo de nia lingvo kaj en ĝia kontrolo!“

Tro ofte vere nur la orientanoj povas montri kio en la lingvo estas bona aŭ nebona, ĉar la eŭropanoj staras tro proksime kaj lingve kaj kulture, por povi pli precize distingi tion. Samkaŭze pentristo ofte recedas de sia pentrata bildo por esplori ĝin je distanco. Ĉar nuanco eble plaĉas de proksime povus impresi malplaĉe de malproksime, detruante la unuecajn tonon kaj harmonion de la bildo.

Krome la orientana ŝato al senkulpiĝo anstataŭ ekskuzo, flugkampanjo anstataŭ aerodromo, ktp, montras, ke tiuj ĉi vortoj ne estas tiel senkoloraj, malbel-

sonaj kaj langorompaj, tiel malelastaj, rigidaj kaj sen ia ajn elvoka kaj esprima forto, kiel tion volis kredi la obstinaj neologismemuloj.

Kaj ili montras, ke la tiel nomataj beleco, esprimforto, vortfreŝeco ktp. estas fakte tro relativaj aferoj; kaj ke la ĉarmo aŭ malĉarmo de senkulpiĝo ne enestas en la vorto mem, sed estas demando de kutimo.

Se ni aŭdus malproksimparolilo pli ofte ol telefono, ni komencus ŝati malproksimparolilo pli multe ol telefono. Sed ĉar ni jam pli kutimiĝis al telefono ol al malproksimparolilo, ni dume preferas la vorton telefono.

Danĝeraj sinonimoj

En ĉiuj lingvoj ekzistas sinonimoj. Tamen nur vortoj de certa speco posedas sinonimojn. Temas precipe pri poeziaj, naturaj, sentaj kaj aliaj ideoj, kies vortaro en ĉiuj lingvoj estas kutime pli riĉa ol la vortaro de la ceteraj ideoj pli malpli nepoeziaj. Sed estas timige, se lingvo posedas sinonimojn eĉ por ideoj tute nepoeziaj, fakaj, seke logikaj kaj ekskluzive sciencaj. Kaj tamen ekzistas tiaj timindaj vicoj en Esperanto: maldekstra — sinistra — lefta — linksa — goŝa — lefa, okcidento — uesto — ŭesto, rajti — lici — durfi — darfi, biciklo — velocipedo, lakto — melko — milko, kvalita — fajna — fejna, flugmaŝino — aeroplano — aviono, oriento — easto ktp. Felice la plejparto de la ĵus cititaj vortoj estas nuraj morte naskitaj provaĵoj konservitaj dokumente jen kaj jen sur paĝoj de gazetoj aŭ sporade dissemataj en kelkaj literaturaĵoj sensignifaj, sed ili neniel reprezentas la veran vortotrezoron esperantan.

Tamen eĉ mortinte ili klare montras la danĝeron. Se la lingvo evoluus laŭ ĉi tiu vojo, post nemultaj jaroj iom post iom ĝi adoptus la radikojn de preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj, al kiuj ĝi nur aldonus la esperantajn finaĵojn: o, a, i, e. Per tio la radikaro esperanta ja neimageble riĉiĝus, sed la lingvo sendube tuj poste mortus sekve de ĉi tiu riĉiĝo, ĉar neniu homo povus memori tiel kreitajn milionojn da radikoj kaj centmilionojn da derivaĵoj. Kaj neniu trovus vojon el labirinto kiu tiam estiĝus, ĉar nur malmultaj esperantistoj sciis poste decifiri, ke la frazo magna editorio ĵus editis splendidan magazinon signifas granda eldonejo ĵus eldonis bonegan gazeton, aŭ sciis rekonii sub, rivo, fleŝo, ari-vi, rio la malnovajn bordo, viando, alveni, rivero.

La lingvo devas esti riĉa. Sed oni ofte forgesas, ke ĝi ne devas esti senlime riĉa. Ĉar senlime riĉa lingvo estus mortinta lingvo aŭ lingvo jam mortanta. Neniu lingvo rajtas esti pli riĉa ol necese. Ĉiu supernecesa riĉaĵo estus ĝermo de morto kaj disfalo. Ĉar senfine riĉa lingvo finfine iĝus neparolebla, aŭ ĝi disfalus en diversajn dialektojn. La latindevenaj radikoj estiĝus tiam eble ian latinecan Esperanton, la germandevenaj radikoj iĝus bazo de ia germaneca Esperanto-dialekto nekomprenebla por la parolantoj de la latinida Esperanto, kaj ĉe la angle parolantaj samideanoj Esperanto verŝajne surpronus anglosaksan veston, fremdan al ĉiuj, kiuj ne scias spiĉi angle.

Cetere jam nun ekzistas en Esperanto tiaj malsamdevenaj sed samsignifaj vortduopoj. Oni uzas tempesto apud ŝtormo, aceto apud vinagro, strando apud plaĝo, diareo apud lakso kaj simile. La anglo-devena esperantisto memkompreneble preferas la formon tempesto, kiu estas pli proksima al li. Samkaŭze la germano uzas ŝtormo prefere ol tempesto kaj el la vortduopo strando — plaĝo li elektas la germandevenan strando dum ĉiu franco pli multe ŝatas diri plaĝo.

Similaj vortduopoj felice ne estas tro multaj en la lingvo. Ili ne montras al ia disfalo de la komuna vortaro, sed ili estas nur mutaj atestantoj pri tio, ke la tiel nomata internacieco de iuj radikoj estas pli ol relativa. Ĉe vortoj kiel palmo, telefono aŭ citrono ne estis malfacile trovi internacie plej ofte uzatan formon.

Sed ĉe tempesto — ŝtormo, strando — plaĝo, aceto — vinagro la lingvo evidente jam hezitis. Tial ĝi retenis ambaŭ formojn, kaj nun la libera evoluo montras, kiu el la ĵus nomitaj paruloj estas pli internacia, pli elasta kaj pli taŭga. La publiko decidis mem!

Tiu ĉi metodo ja estas iom malrapida, ĉar povas daŭri jardekojn antaŭ ol la evoluo faras la decidon, sed kom-

pense ĝi estas plej sekura kaj fidinda. Nenia akademia cerbumado aŭ revolucia tujprijuĝo povus elekti tiel senere kaj definitive kiel tion faras la evoluo.

Cetere la cititaj vortduopoj ne estas definitivaj kaj ili supozeble ne konserviĝos. La lingvo verŝajne ne retenos kaj aceto kaj vinagro, sed tiu el ili, kiun la evoluo elpuŝos kaj elsarkos, foriros poste el la lingvo.

Tamen en iuj vortparoj kiel strando — plaĝo iom post iom eble kreiĝos iaj sencnuancoj. Kaj tiam la lingvo retenos ambaŭ por sin pliriĉigi. Strando tiam verŝajne konservos sian ĝisnunan sencon, dum plaĝo eble signifos sablohavan bordon, oportunan por banado.

Similaj vortduopoj verdire estas nenio eksterordinara en Esperanto. Ni citu nur fakelo — torĉo, armorio — blazono, kozo — afero el la malnovaj. Ĉe ili la evoluo jam decidis. Konservigis torĉo, blazono kaj afero. Armorio, kozo kaj fakelo formortis kaj estis elpuŝitaj el la lingvo. Nun ili estas registritaj maksimume en kelkaj malnovaj vortaregoj, aperintaj en la tempo, kiam ili estis ankoraŭ aplikataj; kaj en kelkaj gazetnumeroj forgesitaj. Interesa inter ili estas precipe fakelo, kiu troviĝas en la esperanta-ĉefia vortaro de Ĉankŝky-Riedl kaj en la Granda vortaro esperanta-ĉefia de fratoj Filip. Ĝi devenas de la latina *facula* (diminutivo de *fax*), kaj la lingvo povis ĝin reteni, ĉar ĝi enhavas mildan nuancon sencan. Ĉe solenaj diservoj ofte estas uzataj torĉoj, kiuj ne respondas al la klarigo, kiun pri torĉo donas Plena Vortaro de Esperanto, laŭ kiu ĝi estas malnova, kruda lumigilo konsistanta el tordita ŝnuro aŭ ligna bastono ŝmirita per rezino aŭ peĉo. La diservaj torĉoj kontraŭe estas kutime nur simplaj kandeloj metitaj en lignan, orumitan tenilon, aŭ metalaj stangoj kun alkohola flamo. La nomo fakelo estus taŭga por ili, ĉar eĉ la naciaj lingvoj distingas inter torĉo kaj fakelo kaj la lastan nomas aŭ latine aŭ per nur iom modifita vorto, devenanta el la latina. Tamen la lingvo ne perdis ion ne adoptinte fakelo apud torĉo.

Ĉiuj ĉi sinonimoj, precipe la komence cititaj strando — plaĝo, tempesto — ŝtormo, kaj aliaj estas atentigo kaj averto. Se similaj duopoj ne estus nuraj provaĵoj nek materialo, el kiu la lingvo elektos, sed se ili multiĝus en la lingvo kaj se iliaj ambaŭ anoj restus konservitaj, ili baldaŭ, kiel ni jam menciis, fariĝus granda danĝero por la lingvo. Okazus io simila, kio okazis en la angla lingvo, kiu iom post iom disfalas sekve de similaj vortduopoj anglo-usonaj. Ni citu nur autum (uzata en Anglujo) kaj fall (uzata en Usono), kiuj ambaŭ signifas aŭtuno, aŭ lift kaj elevator. Kaj se ni konsultas la Grandan vortaron esperantan-ĉefan de fratoj Filip, ankaŭ tie ni trovas tute analogie elevatoro — lifto. La sama vortduopo troviĝas eĉ en Plena Vortaro de Esperanto, kie tamen al ĉiu vorto estas donita iom alia signifo. Laŭ Plena Vortaro elevatoro estas destinata por levi varojn aŭ objektojn (argano), dum lifto servas por porti personojn al supraj dometaĝoj.

La ĵus donitaj ekzemploj do montras, ke sinonimoj ne nur riĉigas la lingvon, sed ke ili ankaŭ povus konduki ĝin al la morto. Kaj el ĉi tiu vidpunkto aspektas la konsiloj de la ĉinaj kaj japanaj samideanoj ekstreme saĝe kaj prudente.

Se nenion alian, almenaŭ tion ili pravas, ke la propraj vortoj, formitaj el la propra kaj aŭtentika materialo, preskaŭ ĉiukaze estas multe pli solidaj kaj fidindaj ol la fremdaj enportitoj, kiuj tro ofte estas nur kaŭzo de malsimpligo kaj ĥaoso.

Cetere krom la ĵus preparolitaj vortduopoj malsamdevenaj sed samsignifaj ekzistas en la lingvo ankoraŭ aliaj malpli danĝeraj vortduopoj, kies unuopaj anoj diferencas inter si nur malgrave. La diferenco konsistas kutime el nura vokalsanĝo aŭ simila bagatelo.

Antaŭ 40 jaroj oni ekzemple ĝenerale uzis la formon pronunti anstataŭ la nun uzata oficiala prononci. Same la lingvo hezitis inter vipero kaj vipuro, ŝofero kaj ŝoforo, difini kaj difini, mumo kaj mumio kaj aliaj. Fine venkis la formoj vipuro, ŝofero, difini kaj mumio. Vipero, ŝofero, difini kaj mumo mortis kaj estis forbalaitaj.

Ankoraŭ pli interesa estas la historio de konkero. En la dana-esperanta vortaro de Bendix el 1909 troviĝas la formo konkvesti. Sed en la vortaro de Verax el 1910 oni jam registris la formon konkver, kiu atingis sufiĉe grandan uzatecon precipe en Internacia Scienca Re-

vuo en 1904 kaj la sekvintaj jaroj. La vortaro de Kabe ankoraŭ en 1925 registras la formon konkiri. Nur en 1930 en Plena Vortaro de Esperanto troviĝas la nun jam ĝenerale uzata kaj oficiala formo konkeri.

La lingvo ne akceptas senelekte ĉion, kion oni enŝovās en ĝin, sed ĝi zorge kribras la importitan materialon, konservante nur tion, kio estas oportuna.

Tial eĉ nun ĝi hezitas inter pingveno kaj pingvino, sed ŝajnas, ke la lastan ĝi preferas. Same daŭras silenta lukto inter patato kaj batato. Sed eĉ ĉi tie la lasta gajnas la batalon. Poste, krom kelkaj aliaj, ankaŭ baledo kaj baletto kverelas pri la pozicioj. Pli da ŝancoj tamen havas baletto.

Ĉio ĉi montras, ke la enkonduko de nova vorto estas afero nek simpla nek malkomplikata. La lingvo ne akceptas pasive ĉion ajn. Ĝi defendas sin akre kaj sagace. Kaj nur taŭgaj kaj bezonaj vortoj rajtas resti kaj persisti.

La interna batalo

La neologisma problemo estas nur unu paĝo el la historio de la ĉiutaga batalo inter la propra materialo de Esperanto, ĉu al unueco, kaj la fremdaj elementoj malpli regulaj kaj eĉ ĥaosaj.

En Esperanto troviĝas aro da internaciaj vortoj kun sufiksoj ne esperantaj, kiel redakcio, evolucio, administracio, redaktoro, direktoro kaj aliaj, kiuj ankoraŭ nun batalas kun la aŭtentikaj esperantaj formoj redaktejo, evoluo, administrejo, redaktisto, direktisto ktp., kaj fakte vivas apude en la lingvo. Kiu el ili venkos en tiu konkurenco?

D-ro Edmond Privat en sia *Esprimo de Sentoj* en Esperanto diras pri tio jenon:

„Laŭ observo de la nunaj faktoj ŝajnas, ke pli sukcesas ĝenerale la esperanta formo, se ĝia senco estas plene ĝala kun la fremda, ekzemple evoluo — evolucio, civilizo — civilizacio, sed kiam la senco estas iom malsama, la lingvo emas konservi ambaŭ por riĉigi siajn eblecojn de esprimado.

Administracio estas oportuna vorto por kovri eĵon kaj aron da homoj, anoniman tuton de administrantaro en administrejo, kiun oni povas kulpigi pri multaj eraroj aŭ krimoj ne akuzante iun apartan personon. Same pri redakcio. Redaktoro estas funkcio, kiun povas plenumi okaza redaktanto aŭ profesia redaktisto. Simile pri prezidento, kiu tamen preskaŭ malaperis sub la premo de la aŭtentika esperanta formo prezidento, malgraŭ la avantaĝo konservi la eblecon uzi la adjektivon prezidenta (palaco aŭ dekreto).”

Tamen ŝajnas, ke la respondo de doktoro Privat rilate al prezidento — prezidento ankoraŭ ne estas tute definitiva. Lastatempe precipe sur paĝoj de ĉeĥoslovakaj gazetoj aperas proponoj distingi inter prezidanto de klubo aŭ kunveno kaj ŝtatestro, por kiu lasta oni preferas la jam preskaŭ elmortintan formon prezidento. Ĉu tiu ĉi distingo estas necesa aŭ ne, tion montras la pli posta praktiko. Ĝis nun tamen ĝenerale pli ofte uzata estas la malnova propra formo prezidento, cetere sen ĉiaj domaĝoj kaj miskomprenoj. Sed tio ne garantias, ke prezidento ne povos iam tamen enradikiĝi.

En Esperanto ekzistas multaj interesaj neologismoj, kiuj iam aperis en la lingvo, dum certa tempo vegetis en ĝi, ĝis fine ili estis forpuŝitaj. Tamen post kelkaj jaroj ili reaperis sub la sama formo, ree provante okupi la iam perditajn poziciojn. Prezidento estas unu el ili.

Tiu ĉi cetere interesa fenomeno pravigas la heziton de la Esperantista Akademio, kiu ne oficialigas vortojn jam dum jardekoj ĝenerale uzatajn, atendante ĉu eble ia interna forto de la lingvo ankoraŭ lastmomente ne elpuŝos ilin el la ĝenerala uzado.

Krome eĉ ĉi tie oni devas ne forgesi la junecon de Esperanto. Sesdek jaroj estas tempo relative tro mallonga, por ke oni povu profeti laŭ ili la estontan evoluon de la lingvo dum la venontaj jarcentoj kaj jarcentoj. Ŝajnas tamen, ke proporcie kun la maljuniĝado de la lingvo kreskos ankaŭ la ŝato de ĝiaj parolantoj al ĝiaj propraj kaj aŭtentikaj formoj, kiuj iom post iom fine elpuŝos la nun uzatajn formojn tiel dire internaciajn.

Oni povas atendi, ke same kiel nun oni preferas evoluon antaŭ evolucio kaj civilizo antaŭ civilizacio oni iam preferos redaktisto antaŭ redaktoro kaj administrejo antaŭ administracio.

Sed en la nuna periodo, kiam la parolateco de Esperanto ankoraŭ estas relative tre malgranda, la lingvo devas konservi ambaŭ, ĉar ĝi ne povas tute malkonsideri la postulojn de internacieco, kiuj ofte estas samtempe kaŭzoj de ĝiaj malsimpleco kaj malreguleco. Sed proporcie kun la kreskanta parolateco de Esperanto malkreskos la postuloj de internacieco kaj la poziciojn de redakcio, administracio kaj aliaj iom post iom transprenos la propraj pure esperantaj formoj redaktejo, administrejo kaj aliaj.

Car en tiu momento, en kiu Esperanto iĝos mondlingvo, formoj kiel redakcio ĉesos esti internaciaj. Ili estas konataj de kelkaj milionoj da homoj. Sed la esperantaj formoj kiel redaktejo tiam estos pro la realiĝinta universaleco de Esperanto konataj de kelkaj centmilionoj da homoj.

Ankaŭ la internacieco estas io nur relativa. Ekzemple en la mezepoko, kiam la latina lingvo estis ne nur internacia kaj universala, sed preskaŭ eĉ gepatra lingvo de la tuta tiutempa homaro, la latinaj vortoj kiel litus, thalamus, lapis kaj aliaj estis sendube tiom internaciaj ke oni verŝajne povis uzi ilin ĉie en la tiama Eŭropo sen timo ke iu ne komprenos ilin. Sed sekve de la nuntempa malgranda konateco de la latina lingvo ili apenaŭ povus servi kiel taŭgaj interkompreniloj. Ilia lokon okupis germanaj, francaj kaj anglaj radikoj, inter kiuj Esperanto poste elektis siajn bordo, lito, ŝtono.

Kaj se la parolateco de Esperanto iam estos pli granda ol la parolateco de la angla lingvo, nenio povos malhelpi, ke la esperanta tranĉilo estu pli internacia kaj tutmonde pli facile komprenebla ol la angla knife.

Nuntempe Esperanto ankoraŭ prunteprenas el la aliaj lingvoj. Sed la latina lingvo, la plej granda pruntedoninto de ne nur Esperanto sed eĉ de la tuta eŭropa lingvofamilio sisteme prunteprenis sian materialon el la greka kaj etruska, kaj la greka jam antaŭe heredis siajn vortojn el la sanskrita kaj la antikvaj idiomoj de la tiama Proksima kaj Centra Oriento.

La latina lingvo do estas klasika ekzemplo (se ni ne volas citi la anglan, kiu estas interesa miksaĵo de latin-franca kaj germana radikaroj), ke iama pruntepreninto povas facile fariĝi pli posta pruntedonanto.

Same Esperanto, se nenio endanĝerigos ĝian evoluon, iam povos returne pruntedoni sian materialon al tiuj lingvoj, el kiuj ĝi iam prunteprenis, kiel ni tion vidas ankaŭ ĉe la angla, kiu precipe en la lasta kaj antaŭlasta jarcentoj pruntedonis al siaj iamaj donacintoj la germana kaj la franca multajn terminojn, precipe tiujn, kiuj rilatas al sporto kiel football, lawn-tennis, volleyball ktp.

Esperanto ĝis nun pruntedonis al la mondo nur unu solan vorton samideano, kiu - ĉu hazarde? - estas nek neologismo nek radikoj. Sed kvankam ĝi sola ankoraŭ ne povas servi kiel argumento, ĝi tamen almenaŭ iom supozigas, ke la vortoj pruntedonitaj de Esperanto al la ceteraj idiomoj estos nek radikvortoj nek neologismoj, sed verŝajne vortoj aŭ regule derivitaj, aŭ simple kunmetitaj el la propra aŭtentika lingvomaterialo. Kaj tiel vole nevole tiu sola ekzemplo donita de samideano estas samtempe atesto pri la valoro de la pritraktataj vortoj. Laŭ tiu atesto do ne la neologismoj, sed la malnovaj antikvuloj estas pli valoraj, necesaj kaj gravaj por la lingvo.

Kaj tial ili vivu, floru kaj kreskegu!

Lingvaj tradicioj

Certa speco de neologismoj estas la tiel nomataj fakterminoj, kvankam ili ne estas neologismoj en la propra kaj vera senco de la vorto.

Fakterminoj kutime estas nomoj por tiuj fakaj objektoj kaj aferoj, kiuj ĝis nun ne havis apartan esperantan nomon, dum la propraj neologismoj estas pli malpli sinonimoj de la jam ekzistantaj esperantaj esprimoj.

Mikra esprimas nenion ĝis nun ne nomitan. La mezuro aŭ la kvanto, kiun ĝi priskribas, jam antaŭ longe estis priskribita per samsenca kaj samsufika malgranda. Male ĉe ekzemple telefono, kiu estas nomo de certa aparato, kiu ĝis tiam ne havis nomon. Tial telefono estas fakterminoj kaj ne neologismoj, malgraŭ tio, ke oni

krome eltrovis ankaŭ tute esperantan nomon de tiu aparato malproksimparolilo, kiu tamen neniam ĝeneraligis malgraŭ la jam supre priparolita emo de la orientanoj al la kunmetitaj vortoj, parte pro sia fortimiga longeco, parte pro sia troa kaj ne tre plaĉa kunmetiteco. Cetere ankaŭ la principo de la internacieco ludis rolon ĉi tie. Telefono estas tiom internacie konata, ke ĝi eĉ ne lasis tempon al similaj provaĵoj kiel malproksimparolilo.

Neologismoj estas sinonimoj de la jam ekzistantaj aŭtentikaj vortoj. Ili estas uzataj literature kaj ili iom post iom eniĝas en la komunan lingvotrezoron. Kontraŭe fakterminoj kutime ne emas miksi sin en la komunan vortprovizon, kvankam tio ne ĉiam estas plenumbla, parte pro la ĝenerala klereco de la nuntempa legantaro, parte pro la granda populareco de la sciencoj, precipe teknikaj kaj naturaj, kiu kaŭzas, ke fakaj terminoj de ekzemple la atoma fiziko fariĝas ĉiutagaj vortoj de la komuna lingvo preskaŭ en la sama momento, en kiu la fizikistoj ilin kreis.

Tamen fakterminoj inter la nove enkondukataj vortoj formas specialan grupon kaj tial ili ne estas temo de nia studaĵo.

Neologismojn en la lingvon enkondukas precipe la tradukistoj. Originalaj aŭtoroj, kvankam ili iam uzas neologismojn, ne bezonas ilin tiom urĝe kaj insiste, kaj preskaŭ ĉiam ili povas ekzisti sen ili. Ĉar verkante ion ili estas pli liberaj ol la tradukistoj kaj sekve de tio ili ne estas tiom ofte devigataj rifuĝadi al diversaj lingvaj kompromisoj, sed preskaŭ ĉiam sukcesas kontentiĝi per la vortprovizo registrita en Plena Vortaro de Esperanto.

Cetere tro multaj neologismoj igas ĉiun libron pli malpli nekomprenebla por la pli vasta publiko, kiu libron, kiun ĝi ne komprenas, simple ne tralegas. Tio eble estas unu el la kaŭzoj, pro kiuj la publiko ĝenerale ne legas la esperantan literaturon, almenaŭ ne ĝian poezian parton. Ĉar por multaj homoj estas ĝene foliumi post la traĝejo de ĉiu linio en vortaro. Krome tre multaj neologismoj eĉ estas en la vortaroj ne troveblaj, ĉar ĉiuj vortaroj ne eviteble pli malpli lame postiras la nuntempon.

Cetere la riĉigo de la lingvo, tiom celata de Kalocsay kaj liaj ideanoj, restas nura fantazio sen samtempa riĉigo kaj altigo de la ĝeneralaj lingvokonoj kaj lingvokulturo. Estas sencele pli la artefaritan literaturan lingvan evoluon antaŭen, se la vera lingvoevoluo ne transpaŝis ĉe la plimulto de la esperantistaro la limojn de la Fundamento.

La aŭtoroj ja puŝu la lingvon antaŭen. Sed ili ne tro malproksimiĝu de la publiko ilin postiranta.

Ne estas hazarde, ke la plej ĉarma, belsona kaj perfekta lingvaĵo esperanta estas la lingvaĵo de diversaj prilingvaj kaj prigramatikaj artikoloj kaj studaĵoj esperantaj. Kaj ne estas hazarde, ke ĝuste tiu lingvaĵo de la tempoj de Zamenhof preskaŭ neniam ŝanĝiĝis, uzante eĉ nun la samajn vortojn, terminojn kaj parolturnojn, kiujn ĝi uzadis antaŭ kvindek jaroj. Kaj ĝuste tiu ĉi lingvaĵo pruve montras, ke la ĉarmon al la lingvo ne donas senfinaj vortŝanĝadoj, novigemo kaj reformoj, sed stabileco kaj tradicio. La esperanta lingvo prigramatika estas jam tradicia. Ne hazarde ĝi estas samtempe ankaŭ la plej forte elvoka, ĉarma kaj ellaborita lingvaĵo esperanta.

La ĉarmon, la mildajn nuancojn neforgeseblajn ne donas al la lingvo la novuloj, same kiel katedralojn ne beligas kelkaj novaj brikoj, metitaj en iliajn murojn dum ilia riparado, sed la maljunaj ŝtonoj, muskumitaj kaj tempogrizaj kaj malnovaj kiel iliaj malnovaj fundamentoj.

Cetere ĉiuj neologismoj estas kiel arbfolioj. Nebezonaĵ, sekaj folioj baldaŭ forfalos mem. Se ili ne forfalos hodiaŭ, la unua pli forta ventekblovo deŝirus kaj faligus ilin morgaŭ, malgraŭ tio, ke unuopa folio iam povas aspekti eĉ grandege, se oni rigardas ĝin mikroskope. Tamen se oni konsideras la tutan arbon kun ĝiaj miloj kaj centmiloj da folioj tutece, oni klare vidas, ke unu plia aŭ malplia folieto ne povas ludi rolon.

Same pri la neologismoj. Unu plia aŭ malplia vorto ne povas endanĝerigi la lingvon, ĉar se ĝi montriĝos maltaŭga, ĝi simple forfalos kaj foriĝos el ĝi.

Ĉiu krio de kelkaj simplistoj, brue asertantaj, ke predo aŭ magra povus detrui la Fundamenton de la lingvo mem, estas, minimume, iom troa. Verŝajne ĝi estas celkonscia mistifiko kaj iom bonintence troigita bluf.

Tamen, aliflanke, oni ne povas nei, ke la enkondukado

de novaj vortoj ofte okazas supraĵe kaj senpripense. Tiel ekzemple oni trovas en la literaturo sufiĉe ofte la baptonomon Tomaso, kiu tute ignoras la latinlingvan formon Thomas, laŭ kiu en Esperanto analogie devus esti Tomo, kiu poste tute regule estigus terminojn tomis-mo, tomistoj ktp. per la nura aldono de la respektiva sufikso ist' aŭ ism' al la radiko Tom'. Sed se oni uzas Tomaso anstataŭ Tomo, tiam la vortojn tomis-mo kaj tomistoj oni ne povas regule derivi de la baptonomo, sed oni devas konsideri ilin kiel memstarajn radikojn kaj lerni ilin aparte. Per tio oni plenstopas la esperantan radikaron kaj la lingvon oni ne riĝigas.

La sama supraĵemo naskas poste ankoraŭ aliajn misvortojn kaj mistermojn. Tiel en la lingvo ekzistas duopo trubaduro — trobadoro. La lasta estas proponita de Kalocsay en Parnasa Gvidlibro. La motivo, kiu igis majstron Kalocsay enkonduki tiun neologismon, tamen restas iom mistera kaj subnebula. Oni enkondukadu novajn vortojn, se tio estas necese. Sed kial trubadoro apud trubaduro? Ĉu pro ritmaj, rimaj kaŭzoj? Aŭ ĉu simple nur pro la mallongeco?

Ĉar fakte estas preskaŭ tute egale ĉu la lingvo uzados trubadoro aŭ trubadoro. Sed la ekzisto de ambaŭ, kaj trubadoro kaj trubadoro, estas ŝarĝaĵo, malhelpo kaj balasto. Trista kaj malĝoja estas almenaŭ sinonimoj. Mi malsamsonas, estas malsame longaj kaj malsamritmaj. Sed trubadoro kaj trubadoro tiom similas unu al la alia, ke oni apenaŭ povas deklari ilin sinonimoj. Kaj alian ekzistkaŭzon ili ne posedas.

Cetere ili almenaŭ ne rompas la gramatikon de Esperanto, kiel tion faras la aliaj enkondukaĵoj de Kalocsay en la Parnasa Gvidlibro (teorie) kaj en la Dantea Infero (praktike), kiel ekzemple as anstataŭ estas aŭ presk anstataŭ preskaŭ. Li tutcerte ne kuraĝus same koncizigadi la hungaran lingvon. La peno estus tro sensenca kaj la kontraŭstaro tro forta.

Sed eĉ la fakto, ke temas „nur“ pri Esperanto ne igas similajn provojn malpli sensencaj kaj malpli stultaj. Se oni asertas, ke Esperanto estas lingvo vivanta, oni ne povas trudi al ĝi diversajn eksperimentojn pridubindajn, sed male oni devas plej zorge eviti ĉian neniel pravigeblan tranĉadon de ĝiaj oficialaj kaj netuŝeblaj vortoj kaj radikoj, ĉar ĉia simila agado estus stulta kaj cetere ĝi atestus pri nur tre malgranda estimo al la lingvo.

Oni enkondukadu novajn vortojn, se tio estas necese. Sed oni almenaŭ ne ŝanĝadu la gramatikon (la prihako de estas ĝis la nura as aŭ de preskaŭ ĝis presk rekte estas atako kontraŭ la Fundamento).

La lingvo ne endanĝeriĝos, se ĝi posedos beja apud flava. Sed ĝi tutcerte mortos tuj, kiam oni atencos la senesceptecon kaj la sanktan netuŝeblecon de ĝiaj 16 reguloj.

Oni amu novajn vortojn. Sed ankoraŭ pli multe oni amegu la malnovan gramatikon. Ĉar la vortoj estas kvazaŭ vesto. Ili venas kaj malvenas. Ili alpreniĝas kaj forpreniĝas. La korpo ene tamen restas. Sed male ĉe la gramatiko, kiu estas kvazaŭ la vivo mem. Se ĝi foriĝas, restus ja nenio.

Niaj vortaroj

Parolante pri neologismoj oni ne povas silenti pri esperantaj vortaroj, kiuj grandparte estas nesufiĉaj aŭ eĉ, bedaŭrinde, nefidindaj. Tial oni devas esprimi sian aprobon al la ideo de samideano Kořinek, kiu antaŭ ne tro longa tempo en pluraj gazetoj esperantistaj proponis kompilon de Kompleta Vortaro Esperanta, kiu konsistus el tri volumoj verŝajne almenaŭ 1200-paĝaj.

Memkompreneble la samtempaj ekonomiaj cirkonstancoj ne permesas tujan eldonon de tia monumenta volumaro, kaj cetere en la nuna momento mankas eĉ la necesa manuskripta materialo.

Por ke la verko posedu sufiĉan aŭtoritatecon, ĝi devus esti eldonita rekte de la Esperantista Akademio mem, kiu havas ĉi tie grandan taskon plenumotan. Ĉar unue ĝi devus kolekti la tutan ĝis nun ekzistantan lingvomaterialon, traserĉi ĉiujn dum 60 jaroj esperantlingvaj aperintajn eldonaĵojn kaj elĉerpi el ili tiujn radikojn, kiuj ne estis registritaj en la Plena Vortaro de Esperanto.

Tiu laborego sen ia ajn dubo estus kolosa kaj nur malfacile plenumbla en mallonga tempospaco. La Akademio devus helpi ĝiaj konsilantaj Komitatoj, kiujn ĝi

posedas nun en jam pluraj landoj. Iliaj anoj versimile volonte traserĉus sialandajn Esperantoliteraturajn kaj Esperantogazetojn kaj tiamaniere oni eble sufiĉe baldaŭ sukcesus kolekti la tutan ekzistantan lingvomaterialon.

Tiun materialon la Akademio poste devus atenteme kribri kaj kontroli. Car estas neeble, ke ekzistu pluraj vortoj por unu sola nocio, kiel ekzemple *k a v i o* — *k o - b a j o*. En la poezio diversaj sinonimoj estas pliriĉigo de la lingvo. Sed ĉe fakterminoj ĉia abundo de sinonimoj estas konfuza, malbona kaj malutila, kaj sekve de tio malaprobinda.

Cetere eĉ tiuj naciaj lingvoj, kiuj estas konataj pro sia sinonimriĉeco, uzas tiujn sinonimojn ekskluzive nur por poeziaj kaj literaturaj celoj, sed en siaj fakterminaroj ĉiajn sinonimojn ili zorge evitegas.

En la kribrado de la kolektita, ofte ĥaosa kaj senorda lingvomaterialo povus la Akademion refoje helpi ĝiaj landaj Konsilantaj Komitatoj.

Detalan laborplanon cetere devus starigi la Akademio mem. Estas nur dezirinde, ke tiun laboron oni komencu laŭeble baldaŭ, ĉar la Lingvo Internacia laŭ nia opinio jam atingis tiun evoluostupon, sur kiu la eldono de simila Kompleta Vortarego ne estas plu lukso neutila, sed urga necesajo. La multeco de diversaj eĉ malutilaj neologismoj la ekziston de tia universala oficiala konsultilo rekte depostulas.

Car se oni hazarde foliumas en diversaj naciaj-esperantaj vortaroj kaj vortaretoj, oni ofte ektimas la ĝangalon, kiu tie malfermiĝas antaŭ la leganto. Plej diversaj neologismoj ĵus enportitaj apud jam longe ŝtoniĝintaj mortintoj kaj fosilioj svarmas tie ope kaj opege. Kaj ili ĉiuj laŭtege elkriegas, ke estas jam necese enporti ordon en ĉi tiun ĥaosegon. Kaj la Kompleta Vortaro de Esperanto povus esti tia ĉiopova ordigilo, kiun oni jam bezonas.

Car oni ne povas nei, ke en Esperanto kaŭze de la dekvina regulo de la Fundamento iam ekegias troa libereco rilate al la enkondukado de novaj vortoj kaj terminoj.

En nacia lingvo neniu uzanto kuraĝus ŝuti en la idiomon tute novajn, ĝis tiam nekonatajn vortojn, dum en Esperanto ĉiu lingvofuŝulo konsideras sin kapabla por ĉi tiu tasko.

Multaj naivaj parolantoj de Esperanto eĉ nun sincere kredas, ke la Lingvo Internacia nepre bezonas *r e t i k u - l o*, ĉar ankaŭ la franca lingvo ĝin posedas; aŭ estas certaj, ke ĝi ne povus vivi sen *b r o d k a s t i*, ĉar la angla lingvo ne vivas sen ĝi.

Ili similas al Kalocsay, kiu same sincere kredas, ke la gramatiko de Esperanto devas esti malsimpla kaj komplikata, ĉar ankaŭ la antikva greka kaj latina gramatikoj estas malsimplaj kaj komplikaj; malgraŭ tio, ke Zamenhof volis ĝin havi simpla kaj malkomplikata.

Kaj ĉiuj ĉi forgesas, ke la plej plaĉa flanko de ekzemple la angla lingvo ne estas ĝiaj latinĝermanaj deveno kaj vortrezoro, sed ĝuste tiuj idiomaj strangaĵoj, kiuj estas tute, ekskluzive kaj ĝisoste anglecaj. Kaj la samo validas senŝanĝe ankaŭ pri la Lingvo Internacia.

Esperanto ne estas interesa pro sia anglolatinida radikaro. Ĝi same bone povis adopti radikaron hindogrekan aŭ ĉinjapanan. Ankaŭ ĝi ne estas interesa pro tio, ke ĝi posedas tiom aŭ tiom da francdevenaj aŭ hispanidaj neologismoj. Sed se ĝi estas interesa, ĝi estas, estis kaj estos interesa ekskluzive nur pro tio, ke ĝi estas antaŭ ĉio esperanteca. La esperanteco de Esperanto estas ĝia plej ĉarma kaj unika trajto kaj aspekto. Kaj homoj, kiuj tro arde defendas ĉiun ajn, eĉ la plej sensencan fremddevenan neologismon, neeviteble similigas sin al frenezuloj, kiuj deklaras, ke Esperanto estas interesa ne pro tio, ke ĝi estas Esperanto, sed pro tio, ke ĝi similas al la franca aŭ la angla lingvo.

Por ni Esperanto estas interesa antaŭ ĉio pro tio, ke ĝi estas Esperanto kaj ne ekzemple *I d o* aŭ *V o l a p i k o*.

Ni trovas ĝin ĉarma pro tio, ke ĝi posedas vortojn kiel *t r a n ĉ i l o*, *n e ĝ b o r u l o* aŭ *r e a p e r a n t o*, kiuj estas netroveblaj en la aliaj lingvoj kaj langaĵoj. Kaj ni trovas ĝian gramatikon laŭdinda ne pro tio, ke ĝi estas malsimpla kiel la gramatiko de la latina lingvo, sed male ĝuste pro tio, ke ĝi estas simpla kaj simplega. La simpleco de la esperanta gramatiko estas la plej granda valorajo de Esperanto.

Kaj tiuj parolantoj, kiuj ne komprenas, ke la speciala ĉarmo kaj valoro de la Lingvo Internacia kuŝas ne en

kelkaj fremddevenaj importaĵoj kaj harfendadoj subtilgramatikaj, sed en ĝiaj derivitaj kaj kunmetitaj vortoj, en ĝia sistemo sufiksa kaj prefiksa, kaj en ĝia simpla fonetiko facile elparolebla same kiel en la fakto, ke ĝia gramatiko konsistas el nur dek ses simplaj lingvoreguloj, tiuj parolantoj devus prefere forlasi la lingvon kaj turni sin al ia pli komplika idiomo.

Ili neniam komprenos Esperanton. Car ili eĉ ne penetris en ĝiajn spiritojn kaj animon.

Pluaj perspektivoj

Konklude oni povas nur ripeti, ke la neologisma problemo ne estas ia izola trajto de la Lingvo Internacia, trovanta analogion nenie aliloke, sed male komuna malsano, kiun simile konas ankaŭ aliaj lingvoj kaj langaĵoj.

Se ni, malgraŭ ĉio, volus precize difini la infekton, ni ne dirus „malsano“, sed eĉ „infanmalsano“. Car nur tro junaj lingvoj kaj idiomoj travivas tiun ĉi krizeton.

Ĉiu lingvo posedas sian neologisman periodon. Ĝi trafas la lingvon en tiu momento, en kiu ĝi estas forlasonta sian elementan estadon kaj iom post iom fariĝonta kultur-lingvo. Kaj precize tiu ponto, tiu nerimarkebla transiro de la malalta ekzistado al la pli alta, definitiva kaj intensa estas karakterizata per la enkondukado de novaj, pli fresaj kaj elegantaj vortoj kaj terminoj.

Tamen tiu transira stadio ne povas daŭri ĉiam. Pli aŭ malpli frue ĝi finiĝos, kaj la firmamento sereniĝos. En la kultura periodo de la lingvo, en tiu ĝia periodo, en kiu la lingvo ĉesos esti infano kaj fariĝos viro, ne plu ekzistos neologisma problemo. Car tiam subite oni ne plu ŝatos la neologismojn, trovante malnova pli bona, pli eleganta kaj, paradokse, eĉ pli mallonga ol olda, kaj ĝenerale oni komencos estimi *p r i n t e m p o* pli multe ol *p r i m a - v e r o*.

Tiun ĉi evoluon Esperanto jam parte trairis, kvankam la nivelo ankoraŭ ne tute trankviliĝis. Kaj ankaŭ tie ĉi la historio mirinde ripetiĝas. Car ion similan longtempe antaŭ Esperanto travivis la franca lingvo kaj, se ni ne volas tuŝi historion tiom malproksiman, antaŭ ĉirkaŭ cent jaroj la ĉeĥa lingvo, en kiu tiam, simile kiel antaŭ kelkaj jaroj en Esperanto, furiozis sama vortenkonduka kaj vortokrea febro, kiu antaŭ nelonge skuis la lingvon Zamenhofan.

Se ni nun tralegas la tiutempan literaturon kaj poezion, en kiuj ope svarmas neologismoj kiel *z k a d*, *k ý s*, *m l n o* kaj aliaj, ni ne povas deteni nin de miro, ĉar multaj el tiuj neologismoj estas nun ridindegaj kaj studento de la ĉeĥa literaturo ankoraŭ ĉi tiam primokas ilin. La ceteraj, kiuj ne aspektas tro ridinde, dume tiom malnoviĝis, ke nur malmultaj lingvoposedantoj povas nun rekonii iliajn originajn sencon kaj signifon.

Krome ankoraŭ aliaj analogioj sin altrudas. La ĉeĥan neologisman periodon la literatura historio baptis „*parnasismo*“. La plej kompleta neologisma kolekto esperanta titoliĝas Parnasa Gvidlibro.

Sed eĉ ĉi tie la similaĵoj ne finiĝas. La esperanta parnasismo havas sian Kalocsay. La ĉeĥa parnasismo havis sian Vrchlický. Tiu ĉi, same kiel Kalocsay, estis spirito klera, multflanka, lingvosperta, sprita kaj literature tre fekunda. Li postlasis verkaron, al kiu nur malfacile oni povus kompari verkaron de iu ajn aŭtoro alia. Li estis tradukanto de hispana, franca, germana, itala kaj aliaj poezioj. Li tradukis ĉeĥlingven Inferon de Dante, konservinte la originalajn formojn kaj rimadon. Tamen nuntempe liajn verkojn preskaŭ neniu plu tralegas. Car ilia parnasisma pralingvaĵo impresas iom eksmode, malnovece kaj mucide.

Ĉi tie la analogioj estingiĝas. Tamen la perspektivoj restas klaraj kaj videblaj.

Cefneologismemulo Kalocsay ne eraru! Tio, kion li propaĝandas kaj kion li kredas progreso, estas fakte nur infana malsano. Tamen ĝi estas neevitebla kaj necesa. Ankaŭ knabino devas malsani por fariĝi virino. Ĝi estas lingva maturiĝado. Spasmo de idiomo, kiu iĝas Lingvo! Ni konas tion! Antaŭ cent jaroj la ĉeĥa lingvo malsanis same! Sed la malsanoj foriĝos. Kaj oni trovos ne nur kelkaj ekzemple *p r e s k a ŭ* estas pli bela ol *p r e s k*, sed eĉ, paradokse, ke ĝi estas pli mallonga ol *p r e s k*.

Post Vrchlický venis Čapek. Kaj post Kalocsay eble iam venos iu, kiu trovos, ke la plej poezia lingvo estas prozo la plej prozega.

Tamen se ne estus veninta Kalocsay (kies genio estas granda kaj nepre nediskutebla), iam en la Estonteco eĉ ne povus veni la atendata Nekonata Venonto.

La neologismaj ekscesoj verŝajne neniel malutilos al la lingvo. Oni povas supozi, ke ankaŭ Esperanto trairos la tempon de sia puberiĝado same sendomaĝe kiel ĝin trairis la aliaj lingvoj vivantaj.

Male oni povas eĉ atendi, ke ekde tiu momento, en kiu la lingvo definitive kaj plene maturiĝos, la nuntempa emo al neologismoj ne nur tute ĉesos ekzisti, sed eĉ ke tiam estiĝos alia emo, inklinanta al la uzado de la malnovaj, oficialaj vortoj esperantaj, emo tute kontraŭa al la emo neologisma.

SCIIGOJ

35-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Parizo la 5—12-an de Aŭgusto 1950. Prez. Georges Warnier, ĝen. sekret. Jean Couteaux, konst. sekret. O. T. Nicolaisen. Adreso: 82, avenue de Clichy, Paris 18. Kongreskotizoj: ĝis jarfino 1949 fr. fr. 1500, ĝis 31. Marto 1950 fr. fr. 1800, poste 2000, edzo aŭ edzino de kongresano 750, 900, 1000, junul(in)o ĝis 20-jara 300, 400, 500, subtenanto (sen kongreskartoj) minimume 1000 fr. fr. Aliĝoj akceptataj ĝis la 1-a de Julio 1950. El la kongresa programo: Interkonatiĝa vespero, solena malfermo, diservoj, laborkunsidoj, fakaj kunsidoj, teatra vespero, kongresa balo, internacia somera universitato, floraj ludoj, filmprezentadoj, oratora konkurso, sporto kaj ekskursoj.

Aŭstralia Esperanto-Konferenco. Post pli ol 20 jaroj la aŭstraliaj esperantistoj aranĝos denove tutkontinentan kunvenon inter la 3-a kaj 7-a de Januaro 1950 en Melbourne. La tutmonda esperantistaro estas invitata sendi tuj (ordinara poŝtaĵo bezonas 2 monatojn, aerpoŝta 10 tagojn) al Aŭstralia Esperanto-Konferenco, Post Box 2122 T., Elizabeth Street, Melbourne, Aŭstralio, esperantaĵojn por la ekspozicio, t. e. salutleterojn, ilustr. poŝtkartojn, rimsalutojn, interesaĵojn, turismajn aŭ aliajn reklamilojn. La Konferenca Komitato premias la plej interesan, belan aŭ kuriozan alsendaĵon per ekzemplero de „Leteroj de Zamenhof“.

Filmistrio pri Nova Zelando, liverita de la Nov-Zelanda Turisma Departemento, estas je dispono de niaj grupoj ĉe ni. Ĝi estas sendata senpage kune kun 12-paĝa klariga teksto esperantlingva. Grupoj aŭ lernejoj, kiuj posedas aŭ povas prizorgi aparaton por projekcio de 35 mm filmaj bildoj, ne preterlasu tiun ĉi okazon por aranĝo de ekstrema interesa kaj instrua vespero. Ni direktas al la prunteprenontoj la solan peton, ke ili rapide resendu la filmon en ordo samtempe kun raporto pri sukceso de la parolado.

Esperanto-filmo pri Danlando ne alvenis ankoraŭ en nian landon. Se ni sukcesos ricevi importpermeson por ĝi, ni donos rapidan informon.

Esperanto Film-Grupo rememoris la 15-an de Junio sian dujaran ekziston. La Grupo korespondis kun 79 landoj, estis tradukitaj 19 tekstaroj (sume 466 paĝoj) al la filmistrioj. Interesiĝo pri la filmistrioj estis kontentiga, oni vendis trioblan kvanton kompare kun la antaŭa jaro. — Ni aldonas, ke ni bedaŭrinde ne povis kunlabori kun la Esperanto Film-Grupo, ĉar pago por la filmo ne estas ebla laŭ nunaj reguloj.

Kunlaboro de la tutmonda laboristaro. La Sindikata Esperantista Asocio Tutmonda okazigis la 15—17 Julio sian unuan kongreson en Strasburgo. Ĝi aprobas la celojn de la Tutmonda Federacio Sindikata, kiuj estas paco kaj justa dispartigo de la riĉaĵoj. Per Esperanto ĝi volas realigi kunlaboron de la tutmonda laboristaro. Ĉiuj esperantistaj laboristoj postulu (aldonante respondkuponon) informojn de J. Coen, 9, rue Arthur Roland, Brussel III, Belgio.

La flugfolietojn de usona pastro J. Kubacki konsideras la Norvega Esperantista Ligo gravaj kaj atribuas al ili ian signifon. La jarkunveno de NEL okazinta la 6-an de Junio akceptis rezolucion konstatantan danĝerecon de tiu agado, kiun ĝi nomas subfosa kaj admonas sinjoron Kubacki, ke li tuj ĉesu ĝin. — Nia modesta opinio estas, ke la tuta afero ne meritas tian bruon.

Oni povas atendi, ke la malnova vortprovizo esperanta tiam plene familiariĝos, akirante tian elvokan forton, pri kiu oni ĝis nun eĉ ne povis revii.

La mirinda vivanteco de la Lingvo trauros eĉ ĉi tiun ceteren naturan kaj normalan krizon.

Esperanto estas jam neneniĝebla. Ju pli multe da tempestoj bruegos super ĝi, ju pli skuaj kaj fortegaj krizoj ĝin agitos, des pli juna kaj forta ĝi sin prezentos morgaŭ.

Ĉar ĝi estas kiel Fenikso. Morgaŭ ĝi releviĝos el cindro de ĉiuj siaj neutilaj, ne-taŭgaj kaj vanaj neologismoj hodiaŭaj pli bela, pli eleganta kaj pli fortika ol ĝi estis hieraŭ, antaŭhieraŭ kaj antaŭ sesdek jaroj.

Turisma servo en Bruselo de Flandra Ligo Esperantista. Pri ĉiuj informoj turnu vin al Robert Loeckx, Konijnjenparken, 109, Bosvoorde-Brussel.

Ekspozicio de infanaj pentraĵoj okazos en Kanagasaki. Prof. Taro Nišiumi, Kanagasaki, per Okubo poŝtoŝicejo, Igoyō-Ken, Japanio, petas kontribuojn de ĉefoslovakaj lernantoj.

ESPERANTISTA VIVO

Edziĝo. Hana Vtelenská kaj nia membro Jaroslav Hošek la 8-an de Oktobro en Doksy. Gratulon!

Edziĝo. Herta Ludvíková kaj Teo Novotný, nia fervora kaj persista kunlaboranto dum multaj jaroj, la 29-an de Oktobro. La edziĝfesto en la ĉefpreĝejo en Liberec estis celebrata esperantlingve de paroĝestro Obruča el Chrastava. Gratulon!

Mortis Štěpánka Bálková, pens. instruistino en Praha, ŝtate ekzamenita instruistino de Esperanto, la 19-an de Oktobro. Ŝi propagandis en katolikaj rondoj.

KORESPONDI DEZIRAS

Júlio Vidal, Rua San Antonio 199, Fonseca, Niterói, E. Rio, Brazilo, dez. intŝ. pk. kaj pm. Nepre respondos. Andrej Machovčák, 22-jara tapetisto, Staškov 42 u Čadce, dez. intŝ. pk. kaj pm. kun tuta mondo.

Bohuslav Matoušek, 18-jara studento de teksista lernejo, Senice na Hané, kun junaj gesamideanoj el Anglujo, Brazilo, Bolivio, Kanado, Argentino, Usono kaj Bengalujo. Interesiĝas pri geografio, psikologio kaj teksista industrio. W. Soemoke, 3 Gwylfa Rd., Townhill, Swansea, S. Wales, Anglujo, pri korp-ecara kulturo, fotografado, kun ĉefia fraŭlino aŭ sinjorino.

Rikimi Nagata, 19-jara studento, 63 Nagasima, Aomori, Japanujo, per let. kaj pk., intŝ. pm.

Kazuo Kawabe, 21-jara fizika stud., 9 Tamade-Simmati-I, Minogo, Osaka, Japanujo, pri ĉiuj temoj.

Tomio Ariyasu, 27-jara fizika stud., 25 Matumusi-dori-I, Abene-ku, Osaka, Japanujo, pri ĉiuj temoj.

Masuhiko Cotuma, 21-jara fizika stud., 4 Kaminosima Minoge, Nakakawati, Osaka, Japanujo, pri ĉiuj temoj.

W. H. Spoelder, tipografisto, Hudsonstraat 125/II, Amsterdam-W., Nederlando, kun ĉs. tipografistoj pri grafikaj kaj sindikataj temoj.

D. Svozilek, Kyjov 300, intŝ. pk., uzit. pm. (po 50), serĉas ŝakistojn-problemistojn.

Zdeněk Janáček, 16-jara stud., Pořadí 336, Uh. Brod, pri ĉiuj temoj kun tuta mondo.

Fino Sabina Česmedgieva, 22-jara ŝtata oficistino kaj stud. de muzika akademio, bulv. Dondukov 81, Sofia, Bulgario, kun ĉs. esperantistoj.

Atenton! — Ne plu deziras korespondi pro troa amaso da alvenintaj leteroj:

Jac. Hakkenes, Rotterdam.

Fino Sprenkels, Rotterdam.

Albert Marmenout, Blankenberge.



La redakcio petas pardonon de la legantaro, ke tiu ĉi numero estas iom tro unukolora. Sed graveco de la artikolo pri neologismoj certe estos klarigo komprenebla al multaj. La venonta numero enhavos kompanse multajn informojn aktualajn.

ČESKÉ LISTY O ESPERANTU

Česká literatura japonsky. V pokrokovém nakladatelství San Iči v Kiotu vyšly tři díly Haškova románu Dobrý voják Švejk. V Tokiu vyjde také v nejbližší době Fučikova slavná Reportáž, psaná na oprátce, a Němá barikáda od Jana Drdy. Všechny tyto knihy překládá japonský pokrokový spisovatel T. Kurisu z esperanta. Do japonštiny byl přeložen také výtah knihy Waltera Storma, který pojednává o únorových událostech v Československu (též z esperantského převodu). (Svobodné slovo 16. X. 1949.)

Esperantisté nás chválí. Holandský hudební skladatel Jacob Feitsma, který se zúčastnil v létě zájezdu dvaapadesáti holandských a belgických esperantistů do Českosloveska, napsal po návratu do své vlasti dopis do Prahy. V dopise také píše: Naše cesta vaší zemi byla nádherná, podivuhodná a nezapomenutelná. Ačkoliv mnozí z nás navštívili různé země, všichni se shodují v tom, že tato cesta překonala všechno. Když celník v Rozvadově předstoupil před výpravu, očekávající prohlídku zavazadel, a rozloučil se s jejími členy prostým, srdečným projevem ve jménu čs. lidu, který si nepřeje nic než v klidu pracovat a žít v přátelství s ostatními národy, bylo vidět slzy dojetí v očích cizích hostů. (Svob. slovo 13. X. 1949.)

Holandští a belgičtí esperantisté chválí Československo. Účastníci 52-členné autokarové esperantské výpravy, která počátkem srpna navštívila ČSR, neskřblí chválou Českoslováků ani toho, co u nás viděli. V časopise Heroldo de Esperanto, který je čten v celém světě, píše A. J. M. v článku, nadepsaném „Vábi zlatá Praha“, nadšeně o Československu. Líčí krásy naší vlasti a zážitky v Karlových Varech, na Kladně, v Lidčích, v Lánech, v Praze, v Jičíně, v Prachovských skalách, v Hradci Králové, v Táboře, v Plzni, v Třebíči, v Mor. Krasu a j. O Brně, městě rychlé a vzorné rekonstrukce, kde byli přijati na radnici předsedou ÚNV B. Ubrem a pohostění v blízké krásné lesní terasové restauraci, se vyjadřuje velmi pochvalně a s přesvědčivým uznáním. Též články v jiných esperantských časopisech o této návštěvě svědčí, že naši zahraniční esperantisté přátelé referují poctivě a objektivně, slouží propagaci naší vlasti a věci míru. A. J. M. končí svůj článek slovy „Na shledanou v Československu“. (Práce, Gottvaldov 8. X. 1949.)

Popularita třebíčských betlemů. Brněnská Nová politika z 22. října přináší výňatky z dopisů, které došly do Třebíče od účastníků letošní výpravy holandských esperantistů, navštívivších toto město. Holanďané byli nadšeni tamními krásnými betlemy, chtějí uspořádat o nich přednášky a žádají obrazový materiál.

Esperanto — jazyk socializmu je dvoustránkový článek dra E. Sahlgiera v čís. 36 časopisu Odborár, Bratislava.

Rakouská pošta k sjezdu esperantistů. Rakouští esperantisté měli v červnu sjezd a rakouská poštovní správa při té příležitosti vydala zvláštní známku za 20 grošů v zelené barvě. Zobrazuje znak esperantistů — hvězdu — nad zkříženými ratolestmi. (Práce, Praha 10. VII. 49.)

Naše národní píseň jde světem. Dobrou propagaci národní kultury v cizině jsou národní písně. Ale kolik se jich od nás do světa dosud dostalo? Nedávno tento problém rozřešili hezkým způsobem bratři Filipovi, kteří přeložili nejhezčí a neoblíbenější české a slovenské národní písně do mezinárodní řeči esperanta, vydali je knižně a poslali do světa. A už tu máme dopis z ciziny — a to hodně z daleka. Píše slečna Yolanda z Rio de Janeiro v Brazílii. Je nadšena krásou našich písní a sděluje, že je bude propagovat, jak nejvíce bude moci. „Vaše písně jdou k srdci,“ píše. Dobrý nápad se vyplatil. (Beseda venkov. rodiny 4. III.)

Lidové noviny z 2. října přinesly v Jazykovém zákampí článek prof. Trávníčka, v němž opakuje své odmítnutí esperanta. Generální sekretář svazu poslal esperantský překlad toho článku prof. Neergaardovi (Holandsko), prof. Privatovi (Švýcarsko) a docentu Kalocsayovi (Maďarsko). Poslední dva odůvodnili svůj postoj dopisy prof. Trávníčkoví, jež jsme mu dodali s českým překladem.

Novaj Esperanto-kartoj de Ĉeĥoslovaka poŝto

La 1-an de Novembro aperis 32 novaj bildaj poŝtkartoj de Ĉeĥoslovaka poŝto. Inter ili nin speciale interesas la sekvantaj 4 kun jenaj surskriboj:

2 Praha — Esperantista centro en koro de Eŭropo

5 Ostrava — Esperantista radiostacio en ĉeĥoslovaka regiono de karbo

8 Turčiansky Sv. Martin — Sidejo de Slovaka Esperanto-Instituto

24 Doksy — Somera Esperanto-Kolegio

La poŝtkartoj kun surpresita poŝtmarko por Kčs 1,50 estas vendataj po Kčs 3,—. Postulu en via poŝtofiĉejo!

Esperantologio. Ne alvenis la promesita kvanto de tiu revuo kaj ni ne povas garantii, ke ni liveros al ĉiuj pagintoj. Bonvolu pacienci!

Rudolf Hromada:

Slovník česko-esperantský

188 stran. Cena Kčs 47,50 vyplaceně.

Objednejte pro členy klubů a pro účastníky kursů.

Librovendejo de EAČSR — povas tuj liveri:

Th. Ĉejka a J. Krumpholtz: Esperanto. Podrobná mluvnice. Kelkaj ekzempleroj (2.50)	Kčs
A. Šilha: Krátká učebnice esperanta (1.50)	20.—
J. Šupichová: Hovoříme esperantsky (2.50)	4.—
Rud. Hromada: Slovník česko-esperantský (2.50)	28.—
Wörterbuch-Bausteine	45.—
J. Šupichová: Kdo je Zamenhof (1.50)	2.—
W. E. Collinson: Esperanto a jeho kritikové	6.—
Kotzin: Na obranu esperanta	2.—
Dr Tom. Pump: Česká a slovenská literatura v esperantu	2.—
O zkouškách z esperanta	10.—
Historia skizo de UEA 1908—1933 (1.50)	4.—
Gramatika esperanta na kor. listku	1.80
Ginz: Esperanto na pošt. cennících	1.—
Ĉeĥoslovaka Konstitucio (sole por eksterlandaj esperantistoj, senpage aŭ por 1 respondkup.)	
Lerneja reformo en ĈSR (sole por eksterlandaj esperantistoj, senpage aŭ por 1 respondkup.)	
Absolon: Moravia Karsto (2.50)	10.—
Vivo kaj arto de Goya	7.—
Vivo de Pissaro	8.—
J. Novák: J. A. Komenský	2.50
St. Schulhof: Bohemaj grenatoj (1.50)	15.—
J. a K. Filipové: Kantareto (2.50)	45.—
Propaganda afiŝeto multkolora	3.—
Kartona afiŝeto (1.50)	5.—
Aligilo al Esperanto-kurso 100 ekz. (4.—)	35.—
Atesto (por kursistoj)	4.—
Stacidoma tabulo el lado, uzebla ankaŭ por klubejo (6.—)	100.—
Leterpapero kun koverto	1.—
Leterpapero kun koverto, aerpoŝta	1.50
Poŝtkarto	—,30
Poŝtkarto kun portreto de Zamenhof	1.20
Poŝtkarto kun novjara bondeziro	1,20
Poŝtkarto „Printempan saluton“ de Toyen	1,20
Insigno malgranda	12.—
Insigno festa kun flago	25.—
Glumarkoj	1.— aŭ 3.50
Glumarkoj de nia kongreso en Liberec 20 ekz.	12.—
Al la prezo aldonu afrankon, notitan inter krampoj. — Kiam ne estas notita, tiam minimume 80 helerojn.	

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů ČSR v Praze II, Malá štěpánská 7. Odpovědný zástupce listu Dr Stan. Kamaryt. Členům Svazu zdarma. Členský příspěvek 70 Kčs. Účet pošt. spoř. 9.602. Tiskne »Cie« v Karl. Varech. Účast na poštovní novinové službě povolena řed. pošt. v Praze č. j. 1A-Gre-2372 OB-48. Dohledací poštovní úřad Praha 022.